

ENHAVO:

1. Esperanto-Muzeo en Svitavy naskigxis sukcese
2. Novaj funkciuloj de CxEA
3. Novaj honoraj membroj de CxEA
4. CxEA-retkomunikoj ekde 2009 novmaniere
5. Korespondi kun afrikaj esperantistoj
6. Cxehxa Esperanto-Junularo aktivas (oficiala rubriko de CxEJ)
7. Kalendaro de Esperanto arangxoj en Cxehxio aux organizintaj el Cxehxio

1. ESPERANTO-MUZEO EN SVITAVY NASKIGxIS SUKCESE

kiel ni jam kelkfoje sciigis en la CxEA-retkomunikoj, la 20-an de septembro solene malfermigxis la nova Esperanto-muzeo en Svitavy, kiu situas en cxarma salono de unu el la plej belaj historiaj domoj de la urbo, Ottendorfer-biblioteko. Per tiofinigxis la unua etapo de intensiva kunlaboro de muzea komisiono de CxEA (JiL™Ä TomeÄŤek, LibuL™e DvoL™ÄkovÄŤ, ZdenÄk Heiser, Petr Chrdle kaj Miroslav Malovec) kun lokaj esperantistoj kaj skipo de urba muzeo frunte de nelacigebla direktorino Blanka ÄŠuhelovÄŤ. La solenan malfermon cxeestis 146 personoj, inter ili i.a. la urbestro de Svitavy JiL™Ä BrÄŤdl kaj direktoro de Esperanto-muzeo en Vieno Herbert Mayer. Mallongan koncerton en esperanto plenumis Elena Puchova kaj Dmitrij Dovjxik. La projekton "Esperanto-muzeo" grave subtenis Ministerio pri kulturo de CxR kaj Esperantic Studies Foundation. La unua ekspozicio, kiu dauxros gxis printempo, prezentas la evoluon de Esperanto ekde la tempo antaux la unua lernolibro de Esperanto gxis nun, sed ankauxla historion de la loka Esperanto-klubo, cxi-jare festanta 75 jarojn de sia fondigxo, kaj nunan Esperanto-agadon inkluzive de tiu sur la reto. Krome estas je dispono multifunkcia informpanelo kun tusxekrano kaj komputilo ekipita per diversaj utilaj datenoj por studantoj kaj esplorantoj, i.a. granda elektronika cxehxa-esperanta kaj Esperanta-cxehxa vortaro. Sed la komisiono jam nun preparas pliajn ekspoziciojn, kiuj sekvos. Al la muzeo estos dedixita granda parto de la lasta cxijara numero de Starto kaj vi povas trovi pliajn informojn kaj fotojn jam nun cxe [www.muzeum.esperanto.cz](http://www.muzeum.esperanto.cz).

2. NOVAJ FUNKCIULOJ DE CxEA.

Dum sia kongreso en PL<sup>TM</sup>erov 3.-5.10. estis elektitaj novaj funkciuloj de CxEA.  
Jen la komitato: prezidantino  
Jana Melich<sup>TM</sup>rkov<sup>TM</sup>, vicprezidantoj: Petr Chrdle kaj Ji<sup>TM</sup>l<sup>TM</sup>Tom<sup>TM</sup>e<sup>TM</sup>tek, sekretario  
Pavel Polnick<sup>TM</sup>,  
kasistino Libu<sup>TM</sup>l<sup>TM</sup>e H<sup>TM</sup>ablov<sup>TM</sup>, membroj Pavla Dvo<sup>TM</sup>l<sup>TM</sup>kov<sup>TM</sup> kaj Miroslav Malovec. La  
kontrogrupon gvidos Libu<sup>TM</sup>l<sup>TM</sup>e  
Dvo<sup>TM</sup>l<sup>TM</sup>kov<sup>TM</sup> (el Svitavy), membroj Vratislav Hir<sup>TM</sup>l<sup>TM</sup> kaj Ludmila Srbov<sup>TM</sup>.  
Interesatoj pri la universala kongreso atentu, ke la kongresa peranto por Cxehxio  
estas ekde nun la  
UEA-cxefdelegitino por Cxehxio Lucie Kare<sup>TM</sup>l<sup>TM</sup>ov<sup>TM</sup> <Lucie.Karesova@...>  
La novaj komitatoj de CxEA kun gvidantino de la kontrolgrupo kaj prezidanto de  
CxEJ farigxas ankaux la novaj membroj de la  
redaktokonsilio por la CxEA-retkomunikoj.

### 3. NOVAJ HONORAJ MEMBROJ DE CxEA

la kongreso ankaux elektis novajn honorajn membrojn de CxEA: Jana  
C<sup>TM</sup>achov<sup>TM</sup>-Hrdli<sup>TM</sup>tkov<sup>TM</sup>,  
Petr Chrdle, Ludmila Klegov<sup>TM</sup>, pastro Josef Xaver Kobza, Pavel Polnick<sup>TM</sup> kaj  
Jind<sup>TM</sup>l<sup>TM</sup>ich Tom<sup>TM</sup>l<sup>TM</sup>ek.  
Gratulon al ili!

### 4. TRI PINTAJ ESPERANTO-KONGRESOJ EN MEZA EUxROPO

Kiel vi povas legi pli sube en la kalendaro, en Liberec okazos la Internacia  
Junulara kongreso, kaj en Bjalystok (PL)  
Universala Kongreso, al kiu AEH organizas buskaravanon. Sed najbare de ni okazos  
ankaux alia grava kongreso,  
nome la 8-a Euxropa Esperanto-Kongreso kune kun 86-a Germana Esperanto-Kongreso  
en Esperanto-urbo Herzberg am Harz (DE)  
de la 18-a de majo gxis la 1-a de junio 2009.  
Gxia temo estas "Esperanto por multkultura Euxropo" kaj enkadre de gxi okazos  
ankaux Euxropa konferenco organizata de EEU  
(Euxropa Esperanto-Unio) sub la temo "Signifo de falo de Berlina muro  
porinterhomaj kontaktoj inter Orienta kaj Okcidenta  
Euxropo". Pli da informoj vi trovos cxe  
<http://gek-eek.esperanto-urbo.de/page.php?pid=70263338>. Kaj se vi pripensas la  
cxeston atentu, ke ekde la 1-a de decembro altigxas la kongreskotizo.

### 4. CxEA-RETKOMUNIKOJ EKDE 2009 NOVMANIERE

Ekde komenco de la jaro 2009 la CxEA-retkomunikoj aperos denove  
lauxbezone, do neregule, kaj gxin denove povas legi cxiu interesato, sendepende  
cxu membro de CxEA aux ne.  
La sxangxo estos nur teknika: anstataux dissendi la kompletan tekston de la  
retkomunikoj estos dissendata  
nur informo, ke aperis nova numero kun la rekta ligilo al la koncerna pagxo de  
la pagxaro [www.esperanto.cz](http://www.esperanto.cz).  
Post klako malfermigxos la teksto kaj vi povos legi gxin aux presi same kiel  
nun.

## 5. KORESPONDI KUN AFRIKAJ ESPERANTISTOJ

Se vi deziras havi korespondamikojn en Afriko, bonvolu peti adresojn de afrikaj korespondemaj esperantistoj de Vladka Chvatalova <sciuro@...>.

## 6. CxEHxA ESPERANTO-JUNULARO AKTIVAS (oficiala organo de CxEJ redaktata de Marek BlahuĽ)

Cxehxa Esperanto-Junularo (CxEJ) kunvenos inter la 25-a ĝis la 27-a de oktobro 2008 en Liberec. Oni elektos novan estraron kaj diskutos pri la Internacia Junulara Kongreso (IJK) okazonta samloke en julio de 2009. Invitilo: <http://esperanto.blahus.cz/cxej/?liberec08>

La someran UK-n en Roterdamo cxeestis 2 CxEJ-anoj: Eva POPELKOVA kaj Marek BLAHUĽ, kiu festsalutis nome de Cxehxio kaj prezentis sian studlaborajxon kaj IJK-n 2009. La IJK 2008 en Szombathely spertis rekordan nombron de 11 cxehxaj partoprenantoj: BAĽra ZAĽVODSKA partoprenis Aktivulan Trejnadon kaj venkis en TEJO-kvizo, Petr DOHNAĽLEK diplomigxis en esperanto-instrua seminario de ILEI/E@I, Marek BLAHUĽ venkis en IS-kvizo kaj reprezentis CxEJ en TEJO-komitatkunsido. Okazis ankaux solena transdono de la IJK-flago, kiu nun jam trovigxas en Cxehxio.

Dan MRZAĽZEK cxeestis ArKonEs en Pollando kaj CxEA-kongreson en PLMerov. La trijarigxinta Praga klubo de CxEJ, kies prezidanto li igxis, vizitis la novan Zamenhof-straton en Prago. La CxEJ-prezidanto Marek BLAHUĽ ankoraux somere cxeestis SES kaj gastigis en Brno usonanon, sed fine de auxgusto forvojugxis al Belgio, kie li dum duonjaro studos kaj interagos kun lokaj esperantistoj. Lia e-taglibro: <http://blahma.livejournal.com>

Estraro de CxEJ sincere gratulas al membrino MarkAĽta TLZAĽL KOVAĽ, kiu la 11-an de oktobro edzinigxis en Krakovo al pola esperantisto Adam WILKUS.

Informoj pri cxehxa junularo troveblas cxe <http://cej.esperanto.cz/>

## 7. KALENDARO DE ESPERANTO-ARANGxOJ EN CxEAHxIO aux organizataj de Cxehxio:

7.-9.11.2008: KAEST (Konferenco Aplikoj de Esperanto en Scienco kaj Tekniko) en DobĽichovice.

Info: [www.kava-pech.cz/kaest](http://www.kava-pech.cz/kaest) aux [chrde@...](mailto:chrde@...)

28.-30.11.2008: Internacia Kultura Festivalo kune kun la 29-a AĽeAa-Saksa Tago, AĽstA nad Labem. Info:

Miroslav SmyAĽka <[m.smycka@...](mailto:m.smycka@...)>.

13.12.2008 AnkRo - Antauxkristnaska renkontigxo en PAsek. Zamenhofa kaj tradicia kristnaska kultura programo. Info: [esperanto.pisek@...](mailto:esperanto.pisek@...)

7.2.2009: Renkontigxo omagxe al centjariĀ'o de Klubo esperantista en ProstĀjov.

Info:

dundeejarek@...

3.-5.4.2009 La 4-a Sabla Printempo en PĀsek. Seminario "Esperanto en Interreto", Lingva festivalo, aldona kultura kaj turisma programo.

Info: esperanto.pisek@....

14.-19.4.2009: Printempa lingva seminario de AEH en la pensiono ESPERO enSkokovy.

Info: nechvilep@...

3.-5.7.2009: Internacia renkontigxo omagxe al centa datreveno de la fondigxo de Esperanto-klubo de doktoro Schulhof kun jarkunveno de AEH-IKEH en Pardubice. Info: aeh-ikeh@...

5.7.-18.7.2009, 19.7.-1.8.2009, 2.8.- 15.8.2008: tri etapoj de Somera Esperanto-Tendaro en Lancxov. Info:

www.set-lancov.cz aux info@...

18.-24.7.2008: Internacia Junulara Kongreso kun la temo "Libereco", Liberec,

Inf.: marek@...

25.7.-1.8.: Universala Esperanto-kongreso en Bjalystok (PL). Informojn pri la buskaravano organizata de AEH

(restas jam nemultaj liberaj lokoj): josef-hron@...

22.-29.8.2009: EKOTUR - Tradicia internacia ekoturisma renkontigxo por biciklantoj kaj piedturistoj.

Svitavy-regiono, info: chrdle@...

9.-11.10.2009: Konferenco de Cxehxa Esperanto-Asocio en Svitavy, kun gvidata vizito de Esperanto-Muzeo. Info: tomecek@...

12.-18.10.2009: INPASEM - Internacia Paroliga Semajno. Kurso por komencintoj kaj seminarioj por jamaj parolantoj. DobĹ™ichovice.

Info: chrdle@...

Cxu vi ne trovis vian arangxon cxi tie? Ne kulpigu nin, sed vin mem kaj sendu la

informojn al la redaktanto de CxEA-retkomunikoj chrdle@...